

## Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede

**la 25-an de oktobro**

ĉe Gilbert Darbellay  
ch. de l'Orme 6, Morrens  
tél. 079 315 14 13




**la 8-an de novembro**

ĉe M.-A. k. Knud SUNIER  
av. des Alpes 150, Montreux  
tél. 021 961 38 56



**la 22-an de novembro**

ĉe Monique Golaz  
E. de Commerce 3, Lausanne  
tél. 079 754 21 60



<http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6>

## Enigmeto

Kolektanto alvenas en butikon de antikvaĵoj. Li vidas moneron sur kiu aperas portreton de imperiestro kun la dato « 32 antaŭ J.-K. ». Li demandas pri la prezo kaj fine decidas ne aĉeti ĝin...

... kial ... kial ???



***Nota: Novembre, Gilberto festosian 80-an naskiĝdatrevenon.***

La membraro deziras al li tre feliĉan feston kaj ankaŭ multajn jarojn kun ni.

## **Laŭzana Esperanto - Societo**

Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22  
+41 (0)76 411 14 55 \* +41 (0)21 647 29 28  
esperanto@citycable.ch \* [www.esperanto.ch/Lausanne](http://www.esperanto.ch/Lausanne)  
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhmann \* 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard \* 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin \* 076 411 14 55 - Kasistino.: Françoise Pétermann \* 079 517 44 43  
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier \* 021 961 38 56

## **Informilo**

Novembro 2013 - n° 9

*"Kion vi scias pri Esperanto, ĝia movado, Zamenhof, famaj esperantistoj, ktp ?"*

**Karlota klarigos al ni pri tio lunde, la 4-an de novembro 2013 je la 20-a, ĉe la unua etaĝo de la laŭzana stacidoma bufedo**

**Sabate la 14-an de decembro**

**Zamenhofs Festo**

*(la programo aperos en la venonta informilo)*

2014

**Sabate la 6-an de januaro**

*decidota*

**Lunde la 3-an de februaro**

*Ĝenerala Asembleo*

**Lunde la 3-an de marto**

*decidota*

**Lunde la 7-an de aprilo**

*decidota*

**Laŭzana Esperanto - Societo**

# Turisma semajno en Greziljono

de la 5-a ĝis la 15-a de julio 2013 (daŭrigo)

Lunde la 8-an de julio je la 9-a : tuttaga ekskurso al Angers kaj Fontevraud. La mezepoka kastelo malantaŭ blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj estas tre impresa. Interne ni malkovris la plej grandan tapetaron de la mondo "La Apokalipso" mendita de la Reĝo Ludoviko la Unua ĉirkaŭ la jaro 1370. En la nuna tempo (1957-1966) la artisto Jean Lurçat faris siajn grandegajn dek tapetarojn "La Kanto de la Mondo". Tiuj esprimas en moderna stilo la kosman vizion pri Homo en Paco kaj Gloro. Ni piknikis en ĝardeno apud la rivero Maine.



La abatejo de Fontevraud estas grandega bieno por monaĥoj kaj monaĥinoj sub la aŭtoritato de la abatino. Dum la regno de Ludoviko la Dekkvara (17-a jarcento) nobelaj junulinoj ricevis tie kristanan edukon. Napoleono ordonis la fermon de la abatejo por transformi ĝin al malliberejo, kie oni nombris ĝis 2'000 viroj. La karceron oni fermis nur en 1963.

Hodiaŭ estas la naskiĝtago de Knud, do vespere malantaŭ la kastelo oni festis lin kun ŝaŭmvino, kuko kun kandeloj. La etoso estas tre gaja.

Marde la 9-an : tuttaga ekskurso direkte al Langeais, kun ĝia kastelo konstruita de Ludoviko la Dekunua en 1465, kie la Reĝo Karlo la Oka edziniĝis kun Anna de Bretagne en 1491. Ni vidis per video la ceremonion kun lumo kaj sono. 15 vaksaj personoj staris ĉirkaŭ la ekrano. Tagmeze ni manĝis en restoracio en la urbeto. En la regiono situas la fama kastelo de Azay-le-Rideau, kiu estas vera juvelo de la Renesanco konstruita post 1510.

La reĝa fortikaĵo de Chinon bonvenigas nin kun ĝiaj memoraĵoj pri la renkontiĝo inter Karlo la Sepa kaj Johana d'Arko en 1429.

Merkrede la 10-an : matene estas libera tempo. Post la tagmanĝo, foriro kaj vizito al Plessis-Bourré, kastelo konstruita de la ministro de

la Reĝo Ludoviko la Dekunua. Tie oni bone vidas la transiron de Mezepoko al Renesanco. En tiu kastelo estas granda salono kun mirinda plafono, pentrita de multe da alkemiaj scenoj.

Ĵaŭde la 11-an je la 9-a : tuttaga ekskurso al Amboise, kie naskiĝis la Reĝo Karolo la Oka. Li konstruigis reĝan loĝejon far italaj laboristoj, kiam li ekregis en 1491 (komenco de la franca Renesanco) kaj mortis tie pro

frapo de sia kapo sur supra trabo de pordo. 400 metrojn for de tiu kastelo oni vizitis la lastan domon de Leonardo da Vinci en la kastelo « Le Clos Lucé ».

En 1516 li akceptis la invitilon de la Reĝo Francisko la Unua. Kiam li estis 64jara, li trapasis Alpoj sur la dorso de mulo. La reĝo regalis lin honore kaj nomis lin la unua pentristo, arkitekto kaj inĝeniero de la Reĝo. Li vivis tie feliĉe la 3 lastajn jarojn de sia vivo. Ni ne mankis vidi la subteran pasejon uzitan de la reĝo por viziti tiun, kiun li nomis « patro ». Interne kaj en la parko estis granda ĝojo por ni admiri liajn ĉefverkojn, maŝinojn, pontojn, ŝipojn, kanonojn, ktp. Tiu homo estis la plej granda viziulo de la tuta historio. Ni tagmanĝis en restoracio, kie atendis nin paro el Hungario, el la urbo Tata. Viktoro ĝuis tiun surprizon.

En Chenonceaux sur la rivero Cher aperis mirinda kastelo. Oni nomis ĝin la kastelo de la damoj, ĉar ĉi-tie vivis Diane de Poitiers kaj poste Katerina de Medicis. Sur la rivero, la granda galerio (60 metrojn longa, 6 metrojn larĝa, 18 grandaj fenestroj) estis balo-salono, kiu estis inaŭgurita en 1577. Ĉiuj ĉambroj estis tre bele meblitaj kaj sur tabloj estis mirindaj florbukedoj. Ekster la kastelo estas 2 ĝardenoj, tute malsimilaj, unu estas tiu de Diane kaj la alia de Katerina. Vere estas kastelo por ĝui la vivon.

(Verkis Karlota - fino en la venonta informilo)